Bulteno de la

# Londona Esperanto-Klubo

2015 novembro-decembro

## Kluba Programo:

**novembro:**

6 Olga Kerzjuk: *La Esperanto-kolekto de la Brita Biblioteko.*

13 Klubanoj: *Raportoj pri someraj renkontiĝoj* (1800h: konsilantaro)

20 Babilvespero

27 John Wells: *Lingva Seminario*

**decembro:**

4 Francisko Garcia: *Kial Zamenhof estis Sagitariulo?*

11 *Zamenhofa Vespero* (gvidata de John Wells) (1800h: konsilantaro)

18 Diskut-vespero. Temo: *Prahomoj: kiam ekestis lingvo?*

25 Neniu kunveno

**januaro 2015:**

1 Neniu kunveno

8 *Novjara Festo*

## Esperanta Kalendaro:


27 dec-3 jan 2016: 14a Novjara Renkontiĝo, Saarbrücken, Germanio. Informo: www.esperantoland.org/nr
18-20 marto 2016: 97a Brita Kongreso de E-o; Liverpool. Informo: www.britakongreso.org (retejo preta baldaŭ)
23-30 julio 2016: 101a Universala Kongreso; Nitra, Slovakio. Informo: www.nitra2016.sk; info@esperanto.sk

## Aliaj anoncoj:

*Prezentu ĉefprogrameron! Se vi havas taŭgan temon kiu amuzos aŭ informos klubanojn, ne hezitu proponi vin al la program-sekretario.*

*Bv. sendi informon al la bultenisto antaŭ 12a decembro por mencio en la sekva Kluba Bulteno.*





Multjara membro kaj iama Konsilanto de LEK **Jacques Wilfrid** (dekstre, supre) forpasis la 5an de oktobro en Woolwich. Al lia edzino Rūta, kaj aliaj familianoj liaj, ni kore kondolencas.

Pri la vivo kaj esperantismaj faroj de Jacques oni informos en estonta Bulteno.

♦ ♦ ♦

Honora Vicprezidanto de LEK **Valerie Atkinson** (maldekstre) forpasis la 7an de septembro en Kingston. Ĉiujn familianojn ŝiajn la Klubo sincere kondolencas.

Naskiĝinte en 1926, Valerie nenion sciis pri Esperanto ĝis 1949, kiam Universala Kongreso okazis en Bournemouth, ŝia junaĝa hejmurbo. Post entuziasma partopreno en porkomencanta ekspres-kurso ŝi membriĝis en la LKK, kaj deĵoris ĉe la kongresa Akceptejo. Tie Valerie renkontis junan esperantiston, Wilf Atkinson, kies edzino ŝi fariĝis tri jarojn pli poste. La novgeedzoj loĝis unue en Wimbledon kaj baldaŭ poste en Worcester Park. Tial ambaŭ fariĝis membroj de Londona Esperanto-Klubo.

Sed ne membroj nur, ĉar siatempe kaj Wilf kaj Valerie elektiĝis al ĝia Konsilantaro kaj rolis oficule. Inter 1957 kaj 1962, kaj denove inter 1974 kaj 1976, Wilf Atkinson oficis kiel Prezidanto de LEK, kaj Valerie prizorgis, kiel Kasisto, la kontojn de la klubo dum pluraj jaroj ek de 1955. Alia rolo ŝia, de klubanoj tre favore aprezita, estis gvidanto kaj ĉiĉerono de promen-ekskursetoj tra Londono.


Agnoskante tiujn kaj aliajn meritojn ŝiajn por LEK, ties Jarkunsido en jaro 2000 nomis Valerie kiel Honora Vicprezidanto de la klubo, kies fidela kaj aktiva membro ŝi estis dum tiom da jardekoj.

(Terry Page)

## Loko, horaro kaj aliaj informoj

Ni kunvenas vendredvespere ĉe Londona Irlanda Centro. Antaŭ la ĉefprogramero kaj dum la paŭzo klubanoj kutime amasiĝas en la komforta enirhalo por kaftrinki kaj babili.

Kutima programo:
18:00 malfermiĝo kaj bonvenigoj
19:15 – 20:15 prelego aŭ alia ĉefprogramero
20:15 – 20:45 paŭzo
20:45 – 22:00 forumo, diskuto aŭ daŭrigo de la ĉefprogramero
22:00 fino




Loko: London Irish Centre,
50-52 Camden Square, NW1 9XB
(tel: 020-7916 7272)
Metrostacio: Camden Town
Fervojo *London Overground*: Camden Road
Busoj: 29, 253, 274, 31.

Kotizoj: £10 jare; fora membro: £6 jare.
Kluba retejo:
http://www.phon.ucl.ac.uk/home/wells/lek

Lokaj grupoj: Kingston: Roy Cliffe 020-8397 5895; Orientlondono: Roy Simmons 01473-461346 rokeby@globalnet.co.uk; Sudlondono: Gregory Porilo 020-8672 8095 esperanto-sleg@tiscali.co.uk.
Federacioj: Orienta: John Redgwell, 17 Dover Close, Braintree, Essex CM7 5TD; Sudorienta: Kevin Murray, 11 Leybourne Ave, West Byfleet, Surrey KT14 7HB 01932-345779 yarrump@gmail.com.

## Letero de nia Prezidanto



Karaj Klubanoj:

Tiu ĉi bulteno bedaŭrinde kunportas malfeliĉigajn novaĵojn, pro lastatempaj forpasoj de du jam karmemoraj LEKanoj – nome, **VALERIE ATKINSON**, ĝisnuna Honora Vicprezidanto, kaj **JACQUES WILFRID**. Ambaŭ pasigis multe da tempo en niaj kunvenoj tra jardekoj, kuraĝigante sennombrajn Esperantistojn kaj partoprenante en diversaj programeroj. Niajn kondolencojn ni sendas inter la parencojn kaj geamikojn de Valerie kaj Jacques. Klubanoj bonvolu atendi la respektivajn nekrologojn en sekvanta bulteno kaj legi intertempe la rilatajn anoncojn aliloke en tiu ĉi numero.

Pri forpasintoj de gravaj LEKanoj, EAB-estrarano **TIM OWEN** ĵus informis min pri la Mort-Jubileo de **HAROLD BOLINGBROKE MUDIE**. Tiu ĉi lasta estis la unua Prezidanto de UEA. Li aldone kune fondis kaj nian klubon propran kaj BEA. Tim taŭge aprezas tiun Esperanto-pioniron 'lumulo'. S-ro Mudie mortis en januaro de 1916 en Francujo, kie baldaŭ okazos omaĝ-ceremonio organizita de Tim – al kiu ni danku, pro ties sindonemo kaj honorigo al tia eminenta samideano. Bonŝancojn ni deziras al ĉiuj partoprenontoj.

Rilate la estontecon, memoru ke en 2016 LEK ŝanĝiĝos je kunvenoj, kunvenlokoj kaj tiel plu. Legu do vigle kaj atente venontajn bultenojn, por scii ĝuste kaj akurate kiaj modifoj havos la plej gravajn efikojn ĉe vi, kiel membro, kiu volas daŭrigi, kiel eble plej pozitive kaj efike, sian subtenon de LEK.

Sincere,
*David Thornell*

Funkciuloj: Honora Prezidanto: Marjorie Boulton; Honora Vicprezidanto:(vaka);
Konsilantaro: David Thornell (Prezidanto kaj Sekretario), Terry Page (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Arturo Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Roland England, Stan Keable, Olga Kerziouk, Matt Peperell, Antony Rawlinson (Program-sekretario kaj Bultenisto), Diana Robin.
Adresoj: David Thornell: Esperanto, c/o London Irish Centre (adreso supre) lek.sekretario@gmail.com;
Arturo Prent: 7 Walton Garden, Hutton, Brentwood CM13 1EJ ap_esp-lek21@yahoo.co.uk,
Terry kaj Anica Page:7 Hampton, Gt Holm, Milton Keynes MK8 9EP terry_page@btinternet.com, anica_page@btinternet.com,
Antony Rawlinson: 5 Thorpe Crescent E17 5BY acj.Rawlinson@ntlworld.com.